

I. F. E. A.
ITALIA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIARI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A." e alla ITALIA ESPERANTO FEDERACIO "F.E.I." (Ente Morale D.P.R. 28-6-1956 n° 1720).

Sede Centrale: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA.

I N F O R M A B U L T E N O = I T A L I A F E R V O J I S T O

Redakcio: Via Donato Creti, n° 61 BOLOGNA (Italio) - Tel. 35.90.71.

N° 5 - 6

Majo kaj Junio 1964-a

14-a Jaro

D A N K O J N

Ĉar ni ne povas respondi persone al ĉiuj kiuj sendis kondolencojn pro la morto de nia Prezidanto Kavaliro ZACCONI, ankaŭ en la nomo de lia familio, de l'I.F.E.A. kaj de la Bologna-Grupo "A.Tellini" ni esprimas miajn sincere-rajn dankojn.

La Estraro de I.F.E.A

16-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO KONGRESO EN BRUSELO

(de nia speciala sendintino)

Malsuprenirante de la trajno en la Centra Stacidomo de Bruselo, 16-a Kongresurbo de la fervojistoj esperantistoj, mi momenton ĉirkaŭrigardis kaj levis, fiere, mian kapon: mi venis de Italio, lando de la suno, de la floroj, de la plej allogaj natur-belecoj, en grizan nordan landon: kompaton kaj kvazaŭ amemon mi sentis por la Belgoj. Sed kiel ĉiujare, mia vanteco ankoraŭ unu fojon devis sperti gravan baton: ankaŭ en la norda Bruselo la suno brilis gaje kaj varme ne malpli ol en mia Bologna: tamen mi havis ankoraŭ esperojn . . . aliflanke la kongreso daŭros semajnon . . . Nu, ĉu vi povas kredi? Eĉ ne unu guto de pluvo, kion diri! Iom da malvarmo por pravigi mian pezan surtuton kaj lan-vestojn.

Sed mi devas paroli ne pri miaj pli malpli malagrablaj okazintaĵoj sed pri la kongreso.

Jam sabate antaŭ la interkonatiĝa vespero la kongreslaboroj komenciĝis per la fakprelega-komitata, redaktora kaj terminara kunsidoj.

Dimanĉon la 10-an de majo en la salono "Patria" okazis la solena malfermo. Post la bonvenigaj vortoj de S-ro Deduytsche Prezidanto de la Belga Fervojista Asocio kaj de la Kongreso, kaj de la ĉeestantaj aŭtoritatuloj, salutis nome de la landaj IFEF-Sekcioj, la reprezentantoj de 16 nacioj kaj de la fervojista junularo. Poste la Prezidanto de I.F.E.F., S-ro De Jong malfermis la kongreson.

Tre agrablan estis la festparolado de S-ro Jaumotte Prezidanto de Belga Esperante Federacio. Interludis per harpo, ĉarma blonda fraŭlino. Per la notoj de la "ESPERO" finiĝis nia selena inaŭguro kaj en multaj okuloj mi vidis brileti larmojn.

Tre allogis nin, posttagmeze, la nacia sinfonia orkestro de fervojistoj kun la "kantistoj de la reloj" kaj diversaj solistoj. Fermis tiun agrablan tagon la internacia bale kiu, laŭ la komento de junuloj kaj nejunuloj, finiĝis tre frue. Tiu ĉi estis la sela rimarko kiun mi aŭdis pri la kongreso: Konsola, ĉu ne?

Lundon la 11-an, matene, ĉiu kongresano, akurate atendis ĉe la halo de la Centra Stacidomo la aŭtebusojn por la vizite al Bruselo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Tre interesan viziton al Atomium, al nova kaj malnova parte de la urbo kaj memorfoton

diskutis, ĝis preskaŭ noktomeze, pri la nova statuto de I.F.E.F. kaj pri aliaj gravaj organizaj punktoj.

Sendube mi kaj la aliaj virinoj pli ŝatis la belegan ekskurson al Dinant, tra la Ardenoj, mardon la 12-an. Per speciala trajno ni forlasis Bruselon: revan pejzaĝon ni preterpasis dum la trajnveturado: dolĉajn montetojn kovritajn per helverda tapiŝo: arbojn altajn, svingiĝantajn al dolĉa kareso de l' vente; blankajn kratagbarilojn, flavajn genistojn, ĉu en grandaj etendaĵoj ĉu en izelaj tufoj: tie kaj tie bovinoj kuŝantaj aŭ ŝafoj avide manĝantaj ŝovis la idilian pejzaĝon. Fine jen Dinant; la Ardena urbeto kien, en la unuaj jaroj de tiu ĉi jarcento, iris la riĉaj kaj noblaj sinjoroj de la maljuna Eŭropo per ĝuj ripozon kaj serenecon. He kiom ilin mi komprenas!

Sub la roko fendita, laŭ legendo, per uffrapo de la ĉevalo Bayard, kuŝas la urbeto kiun la Mozo dividas en du partoj: kiel vigla gardisto, la "Citadelo", kunligita per kablovojo al Dinant, gardas la urbon kaj ĝian riveron. Boatekskurso laŭlonge de la Mozo ĝis Waulsort refreŝigis la kongresanaron.

Merkredon la 13-an, dum la estraro kaj la landaj reprezentantoj kuniĝis por la unua laborkunsido mi iris al Bruges. Se mi estus fabelverkistino certe mi elektus tiun tipan belegan urbeton kiel loĝejo de feinoj kaj elfoj. Malgrandaj pontetoj transiris la kanalojn kie speguliĝas ruĝaj, malaltaj dometoj de la XVII-a jarcento.

En la salono "Patria" la saman posttagmezon, okazis la junulara arta kaj folkloro prezentado. Ni vere ĝuis la Jugoslaviajn popoldancojn kaj la alegorian flagsvingadon: ĉiu ero de la programo estis longe kaj tendre aplaŭdata.

Ĵaŭdon la 14-an, dum okazis la dua laborkunsido, la virinoj vizitis la magazenojn. En granda urbo kiel Bruselo, nia kongreso, preskaŭ estis ne rimarkebla, eble tion pensis la lokaj organizantoj, kiuj aranĝis promenadon tra la malnova urbo, gvidataj de granda orkestro kiu alkurigis, ĉe la pordoj kaj la fenestroj, multajn scivolemulojn; kaj la celon oni atingis, ĉu ne?

Antaŭ la urbodomo, en tiu mirinda kerno de la urbo kiu estas la "Granda Place", orkestro kaj sekvantaro haltis kaj la landaj delegitoj estis akceptataj de la anstataŭantino de la urbestro kiu gratulis kaj dankis la L.K.K.-n pro la elekto de Bruselo kiel kongresurbo.

Je la 20-a horo, enkondukata per S-ro Giessner, okazis, en salono "Patria" la fakprelega esperanto-filmvespero. Temoj estis: 125 jaroj poste - Aplikado de elektroteknike ĉe Belgaj fervojoj - Belgaj sekvencoj.

En la unua parto oni prezentis kolorfilmon, esperante parolatan, por ilustri la evoluon de la Belga fervojo en la lastaj 125 jaroj: ĝi ŝajnis preskaŭ la sekvo de la fakprelego farita en Budapeŝto pri la veldado de la reloj de la Hungara fervojo.

La duan parton, kiu konsistis el la vera fakprelego, legis S-ro De Bruyge kaj estis klarigata per kolorlumbildoj. Referanto estis la Organiza-Konpilisto en la Ĝeneraldirekcio de Belgaj Fervojoj S-ro Hendrichx, tradukante la Franca S-ro Blondeaux. La temo montriĝis tre malfacila por la nespertuloj kiel mi, sed la samtempa klarigo pere de la diapositivoj, esplikis al ni kiel oni realigis la aŭtomatan vagonklasifikadon en la trajnformada stacio Rosset, kaj la traktadon kaj kontregistradon de la transportdokumentoj al la ekspedoj de frajtpecoj pere de la varstacio Bruselo T.T. Ĉiujn tiujn operaciojn oni plenumas per helpo de la elektrotekniko. La lasta parto konsistis el plus esperantlingva kolorfilmo pri Belgio kaj ĝiaj turismaj mirindaĵoj kaj allogaĵoj.

Vendrede la 15-an per speciala trajno ni forlasis Bruselon por la dua tutaĝa ekskurso tra la Linburg-a Provinco. Ni preterpasis belegajn fruktarbarojn, kie la floroj blankaj de la piroj kaj rozaj de la cerizarboj similis al ŝaŭma brodaĵo kontraŭ la verdo de la herbo kaj la silveraj (neologismo kiu signifas arĝenteca) betuloj. Unue ni haltis en Landen de kie ni daŭrigis la ekskurson per aŭtobusoj tra S.Truiden kaj Tengres ĝis Bokrijk, kie ni tagmanĝis en la bienego-kastelo kaj povis viziti ĝin per speciala aŭtotrajno.

En la vastega parko estas rekonstruita vilaĝo de la XVII-a jarcento kun la tipaj pajlokovritaj blankaj dometoj, kun magazenetoj, preĝejo, vent- kaj akvo-muelilcjo: helpas la revenon vivi en tiu pratempo, la vilaĝanoj en malnovaj kostumoj, kiuj ĉe la pordejoj, akceptas la turistojn donante al ili klarigojn.

Post la tagmanĝo ni iris aŭtobuse al Bobbejaanlando situanta meze de erikejaj ebenaĵoj kie ni ĝuis, en belega festsalono, la kanton kaj la humorajojn de gesinjeroj Bobbejaan kaj de aliaj televidartistoj akompanataj de bonega kvankam bruega orkestro.

Tie okazis la fermo de la kongreso fare de S-ro De Jong kaj melankolie ni reenveturigis.

Adiaŭ Bruselo, ĝis la revide venontjare en Hamar (Norvegujo); ĝis la revide baldaŭ, kiel "hamar" signifas en Hungara lingvo.

Delvina GIMELLI

XXX-a KAJ JUBILEA KONGRESO DE I.K.U.E.

En VALENCIO (Hispanio) 23-29 julio 1964

La temo de la Kongreso estas: Per Esperanto al la paco de Kristo.

La provizora programo de la Kongreso estas:

Ĵaŭde la 23-an de julio: Interkona Vespere.

Vendrede la 24-an de julio: Inaŭgura Diserve, estrarkunsidoj de I.K.U.E., L.A.F., A.C.E.E., vizite al la urba muzeo, akcepto ĉe la urbestro, solena inaŭgura kunveno.

Sabate la 25-an de julio: Feste de S.Jakobo. Pontifika Mese, estrarkunsidoj, ĝenerala kunveno, arta kaj muzika hispana festivalo.

Dimanĉe la 26-an de julio: Solena Diserve, vizite al la urbo, prelego, ĝenerala kunveno de LAF, oratera konkurso de LAF, amuza vespere.

Lunde la 27-an de julio: Diserve, estrarkunsidoj de IKUE kaj LAF, ekskurso al Sagunto.

Marde la 28-an de julio: Diserve, estrarkunsidoj. Ferma kunveno, akcepto en la Deputejo.

Merkrede la 29-an de julio: Postkongresa ekskurso al la lago Albufera.

La aliĝojn oni sendu al la adrese de D-ro Herrero: Sekretario de la 30-a IKUE-Kongreso, Calvo Sotelo, 11, Valencia (Hispanujo). Oni sendu samtempe la kotizon al: Viajes Melià, Paz 41, Valencia (Hispanujo) kun la indiko: "Per la IKUE-Kongreso 1964".

35-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

SORRENTO kaj la NAPOLA PROVINCO - Adrese: CENTRO ESPERANTISTA CAMPANO, Palazzo Maddaleni - NAPOLI -

PROVISORA PROGRAMO:

Sabato 19/9 - Gazetara Konference-Interkona Vespere-Kunsido de F.E.I.

Dimanĉo 20/9- Sankta Mese-Solena inaŭguro-Oficialaj akceptoj. Posttagmeze: Asembleo de FEI-Oratera konkurso-Nacia Jarkunveno de Fervojistoj Esperantistoj (I.F.E.A.). Vespere: Balo.

Lunde 21/9 - Laborkunsidoj-Publika Parelado-Nacia Jarkunveno de Instruistoj Esperantistoj. Posttagmeze: Vizite al Napoli per aŭtobuse kaj rendevuo ĉe la Aŭteritatoj. Vespere: Rondi de la Napola Golfo per boato.

Marde 22/9 - Laborkunsidoj-Publika Parelado-Jarkunvenoj de la Itala Esperanta Junularo kaj de Itala Instituto de Esperanto. Posttagmeze: Vizite al Pompei per aŭtobuse kaj Sorrenta Folkloro Vespere.

Merkrede 23/9- Laborkunsidoj-Publika Parelado-Jarkunveno de Italaj Katolikaj Esperantistoj (U.E.C.I.). Posttagmeze: Ekskurso sur la Vesuvio kaj al la Napola ĉirkaŭaĵoj per aŭtobuse. Vespere: Arta vespere kun la partopreno de la Milano Junularo.

Ĵaŭde 24/9- Oficiala fermo de la Kongreso-Finaj Rezolucioj.

Vendrede 25/9 kaj Sabato 26/9- Tuttagaj ekskursoj al Capri kaj al Ischia.

Kongreskotizo: Ĝis la 30-6-1964: FEI-anoj £.2100, familianoj kaj junuloj ĝis 25 jaroj £.1800, ne anoj de FEI £.2700. Post la 30-6-1964: FEI-anoj £.2700, familianoj kaj junuloj £.2400, ne anoj de FEI £.3600.

Aŭdienco ĉe la Sankta Pape Paŭlo la VI-a

Nia membrino Prof-ino Rosa MAUDENTE havis la grandan ŝancon partopreni eksterordinaran eventon: paroli kvazaŭ konfidence kun Lia Sankteco Paŭlo la VI-a. Partoprenis la aŭdiencen P.G. Jacobitti (senlaca kaj lerta Prezidanto de U.E.C.I., la diplomata organizinto de la Aŭdienco), Sac.F. Longoni, Vic-prezidanto de U.E.C.I., F-ino E. Champy, kasistino de I.K.U.E., Prof-ino Antonelli Kohler, nia membrino Prof-ino Maudente kaj sia fratino.

Jen la vertojn de nia amikino:

"La 19-an de majo, ni povis konstati la efikan rezultaton: Esperanto estis oficiale prezentata al la plej alta, grava aŭtoritato en la mondo: nia Papa Meŝte Paŭlo la VI-a. Dum la aŭdienco, kie Li parolis afable al ĉiu el ni, ni emocie aŭskultis Liajn demandojn pri Esperanto, pri la nombro de ĝiaj anoj, la nacioj, kie ĝi estas pli aktiva; parolante franclingve kun pastro Beckers kaj f-ino Champy, Li interesiĝis pri la katolika Asocio I.K.U.E. kaj pri la taŭgeco de la Internacia lingvo, kio akcelas harmonion kaj pacon inter la popoloj kaj estas tiel kongrua al la ekumena spirito de nia tempo. P. Jacobitti siavice proponis enkondukon de Esperanto inter la lingvoj uzitaj ĉe la Vatikana radio por pli vasta dissendo de la Katolika Informaro; kaj la Pape montriĝis multe surprizita ekaŭdante, ke Esperanto estas tiel vaste konata Oriente kaj Okcidente. Li diris, ke la Eklezio favore rigardas kaj kuraĝigas ĉiun klepodon por la interkompreno de la popoloj.

Ni certigiĝis pri Lia interesiĝo, kiam akceptante la donacojn faritajn de P. Jacobitti (2 jarkolektojn de "Nova Civito" lukse bindita kun oraj ornamaĵoj, kvin de "Espero Katolika" same binditaj kaj aliajn esperantaj katolikajn librojn) Li informiĝis pri lia adreso por eventualaj komunikadoj."

Rosa MAUDENTE

Inaŭguroj de "STRATO ESPERANTO" en Massa kaj "STRATO ZAMENHOF" en Carrara

La 25-an de marto pli ol 200 geesperantistoj kolektiĝis en Massa per inaŭguro de Strato Esperanto. La simbelan rubandon tendis Adv. Barbiellini Amidei, Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio. D-ro Mario Dazzini, delegito de U.E.A., D-ro Del Nero, eksurbestro de Massa kaj Adv. Vaena, reprezentanto de Itala Esperanto-Instituto, faris malfermajn paroladojn. Ĉeestis la ceremonien ĉefaj aŭtoritatoj de la urbo. La nova strato iras de la mare al la montoj kaj malfermas belan panoramon.

La sekvantan tagon, la kunvenintoj (kiu intertempe partoprenis en la laborejoj de la 1-a Nacia Kunveno de la Italaj Esperantistaj Instruistoj, pri kiu aperas raporte sekve) veturis al Carrara, kie estis dediĉita strato al la nomo de D-ro Zamenhof. La stratabulon malkovris Parlamentano P.M. Rossi. Parolis i.a. D-ro Dazzini, S-ro Pala kaj Prof. Grosse. Reprezentantoj de la urba kaj regiona politika kaj kultura vivo kaj multnombra publiko partoprenis la manifestacion.

1-a Nacia Kunveno de Italaj Esperantistaj Instruistoj per la enkonduko de la lingvo en la italajn lernejojn

Malfermita de la Provinca viclernejestro, D-ro Cozza, la 25-an de pasinta marto inaŭguriĝis en Massa la 1-a Nacia Kunveno de la Italaj Esperantaj Instruistoj. Partoprenis en ĝi reprezentantoj de la itala sekcio de I.L.E.I. el 20 urboj. La ĉefa teme sur la tagordo kcernis kampanjen por enkonduko de la internacia lingvo en la italajn lernejojn. La raporte de D-ro Dazzini skizis duflankajn laborprogramejn: 1) starigi kursojn per geinstruistoj, bazante sin sur interprete de la leĝo 26-6-1928 N-ro 1297; 2) prepari leĝopropenon por enkonduki Esperanton kiel devigan iompostioman instrufakon en la novan mezlernejan sistemon (Scuola Media Unificata).

Post vasta diskuto la kunveno decidis, ke kvinmembra komisiono, konsistanta el D-roj Dazzini, Minnaja kaj Stoppoloni, Prof. Pacelli kaj Ing. Caraffa, studos la procedon por organizi kursojn por elementlernejaj instruistoj. I.E.F. kolektos informojn pri parlamentanoj, kiujn italaj esperantistoj povos persone influi. Okaze de la kunveno estis disdonitaj 27 unuagrada diplomejoj kaj unu triagrada.

H I D E O Y A G I F O R P A S I S

Ni havas la malĝojn anenci la subitan forpason, sekve de apopleksio, la 6-an de majo, de Prof.D-ro Hideo Yagi, prezidanto de U.E.A. La forpasinto ekupis elstaran pozicion en la scienca kampo. Li finis medicinan fakultaton en la Imperia Universitato de Kioto en 1928 kaj ses jarojn poste, en 1934, li ekupis la katedron de ginekeologio en la Universitato de Okayama. Aŭtero de pluraj sciencaj verkoj, Prof. Yagi fariĝis sinsekve Rektoro de la Universitato de Okayama, vicprezidanto de la Internacia Federacie pri Ginekeologio kaj Akuŝologio kaj Prezidanto de la Azia Ginekeologia Asocio. En 1962 li emiritiĝis kaj transprenis la gvidaden de la Kancera Institute en Okayama.

En la Esperante-movado Prof. Yagi plenumis ŝtupon post ŝtupo ĉiujn funkciojn en la loka, nacia kaj internacia kadroj. Kiel 20-jara studento, en 1919, li fondis Esperante-grupon en Kioto. En 1922 li fariĝis delegito de U.E.A. kaj restis en tiu funkcio dum sia tuta vivo. Li verkis Esperantan leksikon, kunverkis Esperantan-Japanan vortaron, publikigis multnombrajn medicinajn artikolojn originale en la internacia lingvo, gvidis nekalkuleblajn Esperanto-kursojn kaj aktive partoprenis en la Japana Esperante-Movado, kies Prezidanto li estis.

En 1959 Prof. Yagi estis elektita vicprezidanto de U.E.A. kaj, en 1962, ties Prezidanto. Li iniciatis la organizon de la 50-a Universala Kongreso, kiu okazos venontjare en Tokio.

Ĉiuj, kiuj persone konis Prof. Yagi, memoros lin kiel ekstreme ĝentilan, benkeran kaj modestan homon. Lia merala aŭtoritato estis tre granda en nia Movado kaj lia pacema spirito ege popularigis lin en niaj vicoj.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

Nova strato ankaŭ en Casalecchio di Reno-Provinco Bologna. Jen la oficiala komunike: Provinco de Bologna - Komunumo de Casalecchio di Reno.

Al Bologna Esperante-Grupo: "Mi havas la plezuron komuniki al vi, ke ĉi tiu urba Konsilantaro, unufoje, kun decido n-ro 203 de la 26-a de novembro lasta, titoligis "STRATO ESPERANTO" novan straton, konstruitan en tiu ĉi komunumo inter stratoj Garibaldi kaj Piave. La Urbestro: A. Garelli.

VOGHERA HAVAS SIAN ESPERANTO-STRATON. Ankaŭ la ĉarma urbo Veghera, danke al la agado de la loka Esperante-Grupo "A.Stromboli" kaj precipe de nia membro S-ro Carlo Carena, havas sian Esperante-straton.

Okaze de la solena inaŭguro, nia membro D-ro Ing. Giordano Azzi el Como faris interesan paroladon, ilustrante la facilecon kaj utilecon de Esperanto; post li, la urbestro de Veghera esprimis sian benedizojn ke Esperanto disvastiĝu baldaŭ tra la tuta homaro, tiel ke ĉiuj homoj povu interkompreniĝi kaj interfratiĝi per pli bona pacstarigo.

GAZETO DE VICENZA. Tiu estas la titolo de la nova gazeto de la Esperante-Grupo de Vicenza (Italujo). Per peti informojn aŭ deni konsilojn kaj fari observejojn, skribu al jena adreso: S-ro Guido Nichele Via V. Monti, 3 Vicenza (Italio).

ESPERANTO KAJ REKLAMO. La presoficejo kaj Publikaj Rilatoj de "SIP.R.A."-Itala Akcia Societo pri Reklamoj, kiu pritraktas televidajn- kinejajn- kaj gazetajn-reklamojn, eldonas luksan ilustritan monatan revuon, titolitan "SIPRA-DUE". En la lastaj numeroj tiu revuo publikigas dekkvinpaĝan artikolon itallingvan pri Esperanto titolatan "Esperanto en la negoca medio".

Ĝi evidentigas la utilecon kaj taŭgecon de Esperanto en la komercaj kaj industriaj rilatoj, kaj daŭrigas dum la marta kaj aprila numero de la revuo kun multaj fotoj. La verko estas de la fama ĵurnaliste Vitterio E.Tedeschi.

ANONCITAJ KURSOJ. La Kultura Centre de la fabrike F.I.A.T. de Torine anoncis Esperanto-kursen per laboristoj kaj familianoj.

P. Jacobitti en Roma, komencis Esperanto-kursen per Roma Grupo de Farmacistoj

La 15-an de decembro 1963-a oni fondis la "Grupo Esperantista Barese", Prezidanto D-ro Francesco Mascanzoni.

MUZILO ESTAS ESPERANTO EN LA MUZIKA MONDO

Ni ricevis: Paruzel: Lernolibro de Muzilo. Muzilo-kajero N-ro 1.

La aŭtore eltrovis simpligitan sistemon per skribi muziknotojn, per instigi pli multajn personejn al la uzo de instrumentoj. Li diskonigis sian sistemon, kiu en Polujo kaj aliaj landoj jam de 5 jaroj havas multajn adeptojn, pere de Esperanto: tiamaniere li konatigas muzikamantojn kun la internacia lingvo, kaj la esperantistojn kun la muziko.

MUZILO-INFORMEJOJ: DORDRECHT, Nederlando, Frederikstraat, 2 - PIEKARY ŚLASKIE, woj, Katowice, Pollando, Skr.pt. 71 - IBIZA, Balears, Hispanujo, S-ro Francisco Tur Riera.

BARCELONA FOIRO

La Oficiala kaj Internacia Specimenfoiro de Barcelono, ankaŭ ĉijare eldonis afiŝon en Esperanto, en 15.000 ekzempleroj. Ĉiuj esperantistoj povas ricevi ĝin senpage, skribante al: 32-a Internacia Specimenfoiro de Barcelono, Propaganda Fako, Pase de Maria Christina, s/n, Barcelono 4, Hispanujo.

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella postale 320 ROMA (Italia)

La dissendoj okazas de h.18,55 ĝis h.19,10 (M.E.T.) - Ondlongoj metroj:

31,33 = Mc/s. 9,57; 41,24 = Mc/s. 7,27; 50,34 = Mc/s. 5,96.

Prelegantoj: Marde kaj merkrede: S-ro Luigi MINNAJA

Vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

DISSENDOJ EN ESPERANTO-JARO 1964-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

JULIO 1964-a: vendredon la 3-an: Fentanoj de Romo - mardon la 7-an: Tra la literaturo - vendredon la 10-an: Pape Johano XXIII - mardon la 14-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 17-an: Literaturaj kafejoj en Italujo - mardon la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 24-an: La granda itala tipografo G.B.Bodoni - mardon la 28-an: Letrkesto - vendredon la 31-an: la urbo de la itala Esperanto-Kongreso: Sorrento.

AŪGUSTO 1964-a: mardon la 4-an: Tra la literaturo - vendredon la 7-an: Du gesanktuletoj de la karitato - mardon la 11-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 14-an: La nova tunelo sub la Granda S-ta Bernarde - mardon la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 21-an: Latinaj lirikistoj: Catullus - mardon la 25-an: Leterkesto - vendredon la 28-an: Preĝejoj de Romo.

ĈI TIE SVISLANDO - ESPERANTAN PROGRAMON.

La Faktestro: L. Minnaja

La Svislanda Nacia Elsendo je Mallongaj Ondoj en Berna dissendas de la 3-a de majo ĝis la 1-a de novembro 1964-a en sia Eŭropa programo, kvar fojejn per semajne Esperantan Programon laŭ jena kalendare:

Ĉiuj lundoj je la h.13,10 kaj ĉiuj ĵaŭdoj je la h.22,15, parolas S-ro A.BAUR

Ĉiuj merkredoj je la 13,10 kaj ĉiuj sabatoj je la 22,15, parolas S-ro C.

GACOND. Ondlongoj: metroj 31,46 = kc. 9535 kaj metroj 48,66 = kc. 6165.

PAROLAS VARSOVIO . . . PROGRAMO DE LA ELSENDOJ EN ESPERANTO- Aprile-Oktoebro 1964. Radio Varsovie disaŭdigas ĉiutage de la hore 16,30 ĝis la 17,00 hore laŭ la mezeŭropa tempe duenheran programon en Esperanto sur jenaj ondoj:

31,45 m.9540kc/s - 31,50 m.9525kc/s - 41,18 m.7285kc/s - 41,27 m.7270kc/s -

41,99 m.7145kc/s - 42,11 m.7125kc/s - 48,90 m.6135kc/s; kaj sur la meza ondo

200 m.1502kc/s. Aŭskultu niajn konstantajn elsendojn. Adrese: POLA RADIO Esperantaj Disaŭdigejoj, VARSOVIO, Pollando.